

# Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo

**La Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo, kies celo estas eksponi librojn pri ĉiuj temoj el la tuta mondo, okazas en la israela metropolo ĉiun duan jaron. Ĉi-jare (15-20 feb) ĝi okazis en la prestiĝa kongres-centro "Binjane Hauma" jam la 24-an fojon.**

**K**iel antaŭ du jaroj, Esperanto-Ligo en Israelo tutsemajne funkciigis Esperanto-budon, kiu allogis multajn vizitantojn kaj vekis grandan interesiĝon. La budon organizis Amri Wandel kaj deĵoris en ĝi pli ol dek aktivuloj de ELI.

Tiuj el vi, kiuj havis la okazon organizi UK-on aŭ grandan renkontiĝon, eble konas la eksciton kaj adrenalino-plenan senton. La internacia etoso, la neceso solvi problemojn en mallonga tempo, kaj pleje, la homoj: amaso da vizitantoj, kunlaborantoj, jamaj kaj novaj geamikoj. Ĝuste tia estis mia sperto en la libro-foiro, kiu mirinde memorigis la sperton de organizado de la UK en Tel-Avivo.

Malka Zemeli kaj mi reprezentis ELI-n en la impona malferma ceremonio, kie salutis la foiron la ŝtat-prezidanto Ŝimon Peres kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. La fama japana verkisto Hiroki Murakami ricevis la literaturan premion de Jerusalemo, kaj faris imponan paroladon.

Kvankam nia E-budo estis malgranda kompare kun la budoj de grandaj eldonejoj aŭ kulturaj institutoj de ŝtatoj kiel Italio, Germanio kaj Francio, ĝi estis tre aktiva kaj vekis multan atenton. Resumo pri ELI aperis en la oficiala katalogo



1225 (5) majo 2009 ESPERANTO 117

de la foiro hebree kaj angle. Dum la semajno centoj da vizitantoj haltis ĉe la budo, kiu estis centre lokita. Iuj interesiĝis pri la centoj da Esperanto-libroj kaj revuoj, kiuj estis eksponitaj sur la bretoj. Apartan atenton vekis *Asteriks* kaj *La eta Princo*. Aliaj scivolis pri la movado en Israelo kaj en la mondo (ofta demando estis: "Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?") kaj ne malmultaj demandis pri ebloj lerni la lingvon. Kelkcentoj da petantoj ricevis informilon kun bazaj faktoj kaj retadreso pri Esperanto, kiu estis kunmetita speciale por la foiro. Multaj petis aliĝi al la E-kursoj en Jerusalemo kaj Tel-Avivo, kiuj estis anoncintaj ĉe la budo, kaj lasis kontaktadresojn. Aliaj diris ke ili jam lernas per la retkurso "Lernu!". Vendiĝis lernolibroj, vortaroj, kompakt-diskoj, verdaj steloj kaj aliaj varoj por centoj da sikloj.

Dum la deĵorado ni aŭdis plurajn kortuŝajn rakontojn de vizitantoj, ekz. rusdevenaj israelanoj kiuj lernis E-on en Rusio antaŭ multaj jaroj, sed ne havis kontakton kun la lingvo post kiam ili alvenis al Israelo. Kelkaj el ili deziris viziti la E-klubojn en Tel-Avivo kaj Jerusalemo. Alvenis paro el Belgio kiu diris ke ĝi havas esprantistan parencon kiu aktivas en Antverpeno. Evidentiĝis ke temas pri mia bona konato – Ivo Durwael. Venis kolegoj de la Jerusalema universitato, kiel la ĉefo de libro-akirado en la Nacia Biblioteko, kiu akiris por la Biblioteko malnovajn librojn pri Zamenhof, kaj profesoro kiu lekcias pri astro-biologio, kiu volis aĉeti mian libron *La universo kaj ni*. Venis ankaŭ konataj gastoj, kiel Ĥaja, la filino de Ans kaj Hans Bakker, kaj la filino de la forpasinta Josef Murjan, verkisto de E-vortaroj. Mezaĝa virino aĉetis la infankantaron *Venis vespero*, rakontante al sia filino ke kun tiu libro ŝin oni lulis kiel infanon, kaj tre kortuŝiĝis kiam ŝi eksciis ke mi tradukis ĝin en E-on antaŭ 20 jaroj por luli mian filinon Tali, kiu hazarde deĵoris apude... Inter la famaj vizitantoj de



nia budo estis prezidento Ŝimon Peres. Kiam li haltis ĉe apuda budo, mi aliris kaj demandis lin ĉu li memoras ke li estis la alta protektanto de la UK en 2000. Jes, li memoris, kaj kun intereso trarigardis la israelajn kaj jidajn kantojn tradukitajn en E-on, de la KD *Bonvenu Paco*, kiun li tuj ricevis donace (sur la supra foto). Vizitis la budon tri eksministroj: Merc, Sarid kaj Bejlin, kaj la iama vicĉefministro Moŝe Arens. Fine ni renkontiĝis kun la famaj israelaj verkistoj David Grosman kaj Meir Ŝalev. Ankaŭ ili ricevis la kompakt diskon *Bonvenu Paco*.

En la antaŭlasta tago okazis mia publika prelego pri la temo "Esperanto kaj Zamenhof: kial internacia lingvo?", kiu estis anoncita en la oficiala programo de la foiro. Estis pluraj intervenoj kaj demandoj pri la rolo de E-o en la nuntempa mondo, apud kaj malantaŭ la angla. La konkludo de la prelego kaj de la foira semajno estis ke E-o vivas, alternativitas, kaj interesas multajn, eble pli ol ni imagas. **Amri Wandel**